
# Bulteno de la Londona Esperanto-Klubo

2014
majo-junio



**Karlo Bartoŝik 1942 – 2013**

La vizaĝo de Karlo Bartoŝik, kiu mortis la 27an de septembro pasintjare, estis unu el la plej konataj ĉe La Londona Esperanto-Klubo dum multaj jaroj post lia translokiĝo el Prago en 1967. Karlo estis, laŭ la funebra oracio, "unu el la plej inspiraj kaj talentaj arĝentistoj /juvelistoj sur la planedo".

En Londono li prilaboris iujn el la "plej ikonaj pecoj" de revolucia juvelisto Andrew Grima, kaj poste laboris sendepende kaj ekspoziciis tra la mondo. Mi memoras, kiel iuj el ni klubanoj vizitis ekspoziciojn liajn en Londono. Li faris juvelaĵojn por Elizabeth Taylor, kaj por English Chamber Orchestra por donaci al Charles kaj Diana. En 1989 li fariĝis Honora Civitano [Freeman] de la Oraĵista Gildo [Goldsmiths' Company] kaj La Civito de Londono. Iuj el liaj laboraĵoj ekspoziciiĝas en la konstanta kolekto de la muzeo Albert kaj Victoria (ekzemplo bildigita malsupre).

Por la UK en Londono li desegnis kongresan emblemon kaj la reklamafiŝon de londona aŭtobuso, kiu famigis la kongreson. Por mi li desegnis la leterkapon por miaj Esperantaj gazetaraj bultenoj en 1972, kaj por Heleno li kreis geezdiĝan ringon. En 2011 kaj 2012 li kompilis plurajn librojn da artaĵoj, inkluzive de 'Londona Esperanto-Klubo en Portretoj', en kiu rekoneblas ankaŭ aliaj konataj vizaĝoj de la klubo en tiu periodo (http://www.blurb.com/user/store/ktbart). Ni kondolencu al Lucia, kaj la du filinoj, Olivia kaj Paula.

Ian Fantom, 11 aprilo 2014




*(Cigaredlumigilo –kun permeso de Victoria & Albert Muzeo - ©)*

## Kluba Programo:

**majo:**

2 Socia Vespero

9 John Wells: *Lingva Seminario* (1800h: konsilantaro)

16 Klubanoj: 5-minutaj prelegetoj – temo *El miaj plej fruaj memoroj*

23 90-jara Datreveno de nia Honora Prezidanto, D-rino Marjorie Boulton

30 Socia Vespero

**junio:**

6 John Wells: *Lingva Seminario*

13 Klubanoj: ***Vendredo la 13a - kial la superstiĉo?*** Ĉies anekdotoj, scioj, teorioj (1800h: konsilantaro)

20 Ludvespero (gvidanto: Matt Peperell)

27 Heleno Fantom: *El la Maniko de nia Librobretaro*

**julio:**

4 John Wells: *Lingva Seminario*

**estonta programo:**

16 julio (merkredo): filmo pri Esperanto, kun klariga prelego kaj leciono, ĉe *The Floating Cinema*. Detaloj aperos en la sekva bulteno (julio-aŭgusto).
18 julio: Promeno en *Victoria Park* kaj *Regent's Canal* (konfirmenda)

## Esperanta Kalendaro:

26 julio-2 aŭgusto: 99a Universala Kongreso, Bonaero, Argentinio http://uea.org/kongresoj
26-29 septembro: Internacia Amikeca Renkontiĝo, *the Friars*, Aylesford, Kent. Informo: Anica Page (kontaktdetaloj inverse).

## Aliaj anoncoj:


*Prezentu ĉefprogrameron! Se vi havas taŭgan temon kiu amuzos aŭ informos klubanojn, ne hezitu proponi vin al la program-sekretario.*

*Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 21a junio por mencio en la sekva Kluba Bulteno.*

## Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere ĉe Londona Irlanda Centro. Antaŭ la ĉefprogramero kaj dum la paŭzo klubanoj kutime amasiĝas en la komforta enirhalo por kaftrinki kaj babili.

Kutima programo:
18:00 malfermiĝo kaj bonvenigoj
19:15 – 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero
20:15 – 20:45 paŭzo
20:45 – 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la ĉefprogramero
22:00 fino




Loko: London Irish Centre,
50-52 Camden Square, NW1 9XB
(tel: 020-7916 7272)
Metrostacio: Camden Town
Fervojo *London Overground*: Camden Road
Busoj: 29, 253, 274, 31.

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.
Kluba retejo:
http://www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/lek

Lokaj grupoj: Kingston: Roy Cliffe 020-8397 5895; Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346 rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo 020-8672 8095 esperanto-sleg@tiscali.co.uk.
Federacioj: Orienta: John Redgwell, 17 Dover Close, Braintree, Essex CM7 5TD; Sudorienta: Kevin Murray, 11 Leybourne Ave, West Byfleet, Surrey KT14 7HB 01932-345779 yarrump@gmail.com.

## Letero de nia Prezidanto



Karaj Klubanoj:

Dankojn al ĉiuj partoprenintoj de la lastatempa Jarkunsido – kaj personan dankon al **TERRY PAGE**, pro ties ege glata prezido (dum mi, kiel Sekretario, protokolis). Tiu kunveno estis kaj sukcesa kaj ĝisdatiga por LEK ĝenerale.

Tiuteme, **OLGA KERZJUK** nun revenas, post ioma foresto, al la Konsilantaro, kie ŝi inspire kunlaboris antaŭe – kaj baldaŭ kunlaboros denove. Gratulon je ŝia elektiĝo!

Jen alia danko: al **IAN FANTOM**, pro la nekrologo pri nia karmemora **KARLO BARTOŜIK** (vidu dorspaĝe). La eldonitan volumon de desegnoj kaj karikaturoj fare de Karlo, LEKanoj oni reĝuis kelkfoje dum tiu ĉi jaro ĉe la LEKejo. Lia volumo restas bela, videbla eĥo de nia kluba historio – kaj de Esperantujo, tra la okuloj kaj spirito de la artisto. Tial, kaj pro sennombraj aliaj kialoj, la Jarkunsido solene observis Silenton honore al Karlo. Eternan saluton al li.

Nun ni turnu al la baldaŭa estonteco. Ĝuste ni pripensu la *antaŭ*-ferian sezonon de printempo. Ĉar ĝuste tiam ni klubanoj kunvenu, por instigi unu la alian al (aven)turismo en Esperantaj aferoj dum la somero. Ne nur planu, sed *kun*-planu! Saltu en entuziasmon pri venontaj vojaĝoj kaj renkontiĝoj – ĉar ili ambaŭ donos amason da raportgeneriloj al vi, kiu poste dividos ĉion al viaj amikoj post via reveno al Londono. Ĉu ne? Certege!

Sincere,
David Thornell

Funkciuloj: Honora Prezidanto: Marjorie Boulton; Honoraj Vicprezidantoj: Valerie Atkinson, Husejn Al-Amily; Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Terry Page (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Matt Peperell, Olga Kerziouk, Antony Rawlinson (Program-sekretario kaj Bultenisto).
Adresoj: David Thornell: Esperanto, c/o London Irish Centre (adreso supre) lek.sekretario@gmail.com;
Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ ap_esp-lek21@yahoo.co.uk,
Terry kaj Anica Page:7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP terry_page@btinternet.com, anica_page@btinternet.com,
Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY acj.rawlinson@ntlworld.com.